

Festivala Folio

BJELOVAR
KROATIO
2017
INTER-FEST

n-ro 4
mardo
la 8-an de aŭgusto
2017

KURIERO DE INTER-FEST

VIGLE PRI LA FESTIVALA TEMO

La lundaj programoj plejparte okazis en la Altlernejo. Ili komenciĝis per la ronda tablo pri la festivala temo *Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo*, pri kiu prelegis Tomasz Chmielik el Pollando, Georgi Mihalkov el Bulgario kaj Neven Kovačić el Kroatio.

Chmielik prelegis pri la temo *Esperanto kiel perilo de kulturaj valoroj*, akcentante la neeviteblan rolon de la literaturo. La perspektivo de Mihalkov reflektiĝis en la prelego *Ponto al la kultura kunfandiĝo*, en kiu li aserta, ke diversaj lingvoj fermas nin en mallarĝajn limojn, kiujn povus transponti Esperanto kiel efika perilo.

Kovačić plilarĝigis la temon kaj argumentis pri *Terenoj de kunfandiĝo*, en kiu li emfazas, ke kunfandiĝo okazas parte spontane kaj parte planite, kaj la pluraj terenoj de kunfandiĝo estas interplektitaj, okazantaj senĉese, ĉie kaj nerimarkite. Li mencias plurajn terenojn, kiaj estas juro, arkitekturo, gastronomio, modo ktp.

El la prezentitaj prelegoj klaras, ke kunfandiĝo estas plurtavola kaj natura procezo, okazanta pli ofte ĉe proksime rilatantaj nacioj, kiuj influas unu la alian, ol ĉe malproksimaj kaj nenajbaraj nacioj. Tio aŭtomate asocias pri la nepreco de kunfandiĝo en Eŭropo/Eŭropa Unio, kiu funkcias kiel konfederacio.

Post la prelegoj okazis vigla diskuto, kiun oni daŭrigis ankaŭ post la fino de la ronda tablo.



Supre: la publiko. Malsupre: la prelegantoj (Tomasz Chmielik, Georgi Mihalkov, Neven Kovačić kaj la moderato Josip Pledin)

PIKNIKO - NEPRE TRALEGU!

Por kompletigi liston de ekskursantoj ni petas ĉiujn festivalanojn, kiuj planas **PIKNIKI EN VELIKI GRĐEVAC**, ke ili konfirmu sian partoprenon **NEPRE JAM HODIAŬ** al la festivala sekretario Josip Pledin per telefono +385 98 248 574 aŭ persone en la Altlernejo dum la hodiaŭaj programoj. **Al la pikniko, kiu okazos la 9-an de aŭgusto** ni veturos per propraj aŭtomobiloj. Ni startos el la granda parkejo ĉe **Trg hrvatskih branitelja** je la 9h00. Kunportu muzikilojn, pilkojn kaj aliajn aferojn por amuziĝi (ŝakon, sociajn ludojn) kaj bankostumojn.



INTERNACIA KONCERTO EN AGRABLA VESPERO

En la agrabla somera vespero, la 6-an de aŭgusto, en la urba parko okazis la internacia koncerto. La ĉeestantoj havis la plezuron ĝui la talenton de la Esperanta muzikanto kaj verkisto s-ro **Mikaelo Bronŝtejn**, kiu plenumis rusajn kaj jidajn kantojn el sia riĉa repertuaro. La zagreba operkantisto kaj sperta esperantisto s-ro **Neven Mrzlečki** inspire kantis mondkonatajn kroatajn, brazilajn, kubajn, hispanajn, italajn kaj grekajn kantojn. Lia belega voĉo alloge sonis en la silenta vespero, kaj vekis romantikajn sentojn en la aŭskultantoj.

Françoise kaj Dédé el Francio violonludis kaj prezentis al la publiko diversajn belegajn melodiojn.

La koncerto estis bonega travivaĵo por ni ĉiuj, kiuj ne deziris, ke ĝi finiĝu.

(Georgi Mihalkov)



LA KVINA DEKLAMKONKURSO

La Deklamkonkurso okazis la kvinan fojon. Malpli granda ol kutime kaj sen la kategorio de bazlerneĵanoj, ĝi tamen agrable efikis en la lunda antaŭtagmezo. Diference de la aliaj jaroj, la ĵurio estis plene internacia: Lidia Liĝeža el Pollando, Georgi Mihalkov el Bulgario kaj Mikaelo Bronŝtejn el Rusio.

La ĵurio opiniis, ke en la kategorio de plenkreskuloj, la plej bonaj deklamantoj estis: 1. Reneja Mihelič el Slovenio, 2. Inita Tamoŝiŭnienė el Litovio kaj 3. Aranka Laslo el Serbio, kaj en la kategorio de studentoj: 1. Andrea Horvat, 2. Robert Milijaš kaj 3. Mihaela Cik, ĉiuj el Kroatio. La plej bona deklamanto de la ĉi-jara konkurso, senkonsidere pri la kategorio estis Ivana Pleskina el Kroatio, al kiu laŭmerite iris la pokalo. Ŝi tre trafe deklamis la poemon de Kolomano Kalocsay *Ezopa fablo*.



La plej bona deklamanto de la ĉi-jara konkurso, senkonsidere pri la kategorio estis Ivana Pleskina el Kroatio, al kiu laŭmerite iris la pokalo. Ŝi tre trafe deklamis la poemon de Kolomano Kalocsay *Ezopa fablo*.

MAJSTRA TRADUKO DE FURORA ROMANO



En la belega salono de la Popola biblioteko *Petar Preradović*, inter la bretoj kun multaj libroj, la 7-an de aŭgusto (19h00) kolektiĝis partoprenantoj de INTER-FEST kaj loĝantoj de Bjelovar por prezento de la Esperanta traduko de la romano *La nigra patrino tero* de la juna kroata verkisto **Kristian Novak**.

Sinjorina **Irena Hlupić-Rašo** anstataŭantino de la biblioteka direktoro, prezentis al la ĉeestantoj la s-ron **Josip Pleadin**, la tradukinton, s-ron **Tomasz Chmielik**, la provleganton, s-ron **Zdravko Seleš**, kiu parolis pri la libro kaj s-inon **Ljerka Stilinović**, kiu legis fragmentojn el la romano.

Zdravko Seleš en sia parolado emfazis, ke *La nigra patrino tero* estas unu el la plej atentokaptaj nuntempaj romanoj en Kroatio. Ĝia aŭtoro **Kristian Novak** estas juna, sed jam verkis tri romanojn, kiuj havis neordinaran sukceson. Liaj romanoj estas tradukitaj al kelkaj lingvoj, kaj surbaze de ili estis faritaj filmoj kaj teatraĵoj.

Mallonge, sed ege profesie, Seleš analizis la enhavon de la romano kaj menciis, ke ĝi estas plurtavola verko, kiu pritraktas aktualajn problemojn – sociajn, psikologiajn, ekomologiajn.

Tomasz Chmielik parolis pri la eksteordinara nuntempa efiko de tiu ĉi sukcesa verko. El lingva vidpunkto ĝi estas rimarkinda, ĉar la aŭtoro uzas esprimriĉan lingvaĵon kaj dialekton, kiu provokis la tradukiston transdoni tiun ĉi riĉecon en Esperanto.

S-ro Pleadin parolis pri la traduka laboro kaj pri sia ambicio doni al Esperanta legantaro unikan verkon, kiu prezentas la pensmanieron, la filozofion de la moderna kroata verkisto.

Sinjorino Ljerka Stilinović legis fragmentojn el la romano kaj tiel ilustris la allogan enhavon de la verko.

La Esperanta traduko de *La nigra patrino tero* estas fenestro ne nur al la verkista talento de Kristian Novak, sed al la nuntempa kroata kulturo.

(Georgi Mihalkov)



Fotis Sanja Pleskina Forjan

***La refreŝiga pluvo de l' vespero
Ĉarmigis ĉiam milde en etero
Por buntu l' poezi' dum tago tria,
Muziko, ebriĝe malebria.
Por ke l' diskutoj daŭru kaj progresu
kaj la kontent' pri Inter-Fest ne ĉesu.***

***La gitaro kaj la ĉielo
Kunfandiĝis por la belo
Post la ronda tablo riĉa
Pri Eŭropo kunfandiĝa
Paroladoj kaj muziko
Multe plaĉis al publiko
Aplaŭdanta aŭ dormanta
Pri la tria tago kanta.***

(Mikaelo Bronŝtejn)

EKSKURSOJ

***Estas ankoraŭ liberaj lokoj por la
ekskursoj E-4 kaj E-5. Bonvolu aliĝi ĉe la
festivala kasistino s-ino Polašek.***

KIAM ARĈO AKOMPANAS KORDOJN



*Neven kaj blanka kune muzikas
(Fotis Sanja Pleskina Forjan)*

La programero anoncita kiel *Esperanto-koncerto de Neven Mrzlečki*, okazinta lunde (la 7-an de aŭgusto) en la Altlernejo, povis esti nur unu en vico da similiaj koncertoj, sed ĝi fariĝis eksterordinara festo por la oreloj. La konata operkantisto Mrzlečki kaj la juna studentino Blanka Laslo antaŭe ne konis unu la alian, sed tio ne mahelpis ilin ekmuziki kune en la bjelovara festivalo. Eble oni povus komenti, ke temis pri improvizado, sed ĝi fariĝis unuaklasa travivaĵo por la kolektiĝintaj muzikŝatantoj.

Neven Mrzlečki en la konata kaj senpriĉa stilo gitaris kaj kantis aron da orelagrablaj melodioj en Esperanto, kiujn "spicis" la arĉo kaj kordoj de la violonĉelo de Blanka Laslo, kiu akompanis lin en kelkaj muzikpartoj.

Estus mirinde, se la du novaj gekonatoj preparus komunan koncerton, ĉar iliaj muzikaj kapabloj evidente postulas tion.

MUZIKA KVIZO: Françoise el Francio havis tre originalan kaj amuzan ideon. Ŝi violonludis diversajn melodiojn kaj petis la publikon diveni el kiu lando estas la melodio. Ni provis, sed ne ĉiam sukcese. Tamen, la prezento de Françoise estis utila ĉar ŝi memorigis al la ĉeestantoj la muzikan mondan riĉecon.

POEZIA PROVOKO: Lidia Ligeza el Pollando preparis mallongan programeron *Pri kelkaj erotikaj detaloj kaj ne nur*, dum kiu ŝi legis siajn poemetojn en Esperanto, kiuj estis rimarkindaj ĉar ili enhavis humuron kaj vortojn, kiujn ni ne ofte uzas en ĉiutagaj konversacioj kaj tiel ŝi provokis nian intereson al la Esperanta vortotrezoro.

NE NUR PRI JURO ...

La unuhora filmo *Esperanto* estis projekciita en la Kultura kaj multimedia centro dimanĉe, la 6-an de aŭgusto. Laŭ relative tre objektiva vidpunkto la franca aŭtoro **Dominique Gautier** pritraktas la temon kaj fenomenon de Esperanto, rigardatan flanke de la esperantistoj mem, sed ankaŭ de lingvistikaj fakuloj. En la filmo aperas konataj nomoj (ekz. Brian Moon, Bruneto Casini) de Esperantujo, kiuj argumentas favore al la Internacia lingvo, menciante spertojn akiritajn dum sia multjara agado. La tuto estas bone garnita per diversstilaj muzikaj eroj, kiuj ekzistas en Esperantujo: h+korusa kantado, roko, hiphopo ktp.

Filmita originale por franclingvanoj, ĝi enhavas partojn tute franclingvajn, sed tamen Esperanto ne postrestas en la alparoloj de la intervjuitoj. En lafranclingvaj partoj, helpas la Esperantaj subtitoloj.

Gravas mencii, ke la aŭtoro ne estas amatoro, kaj la prezentita filmo estas farita je pli profesia nivelo ol oni atendas de esperantistoj. Ne mirinde, ĉar la filmo estas ĉefe preparita por nacilingva informado.

Post la filmo, en la sama agrabla salono de la bone klimatizita Kultura kaj multimedia centro okazis libroprezento de la verko *Elektitaj tekstoj pri Internacia juro* de Ivo Lapenna, eldonita okaze de lia 30-jara morto-datreveno. Ĝi estis iomete neordinara

prezento, enkondukita per du violonĉelaj eroj de la tre talenta juna muzikistino Blanka Laslo el Subotica, kiu studas violonĉelon en la Muzika Akademio de Debrecen (Hungario).

La libro-prezento fakte parolis pli multe pri la aŭtoro, ol pri la verko. La riĉe ilustritan projekcion titolitan *La konstruinto de la moderna Esperanto-Movado* pri la vivo de Ivo Lapenna, preparis Josip Pleadin. Iom pli ol 40-minuta prezento malkaŝis al la spektantoj la tutan abundon kaj variecon de la intereso de Lapenna, kiu laŭprofesie estis juristo.

Oni eksciis, ke la prezentata libro konsistas el 42 prelegoj kaj represitaj gazetartikoloj pri la temo de internacia juro, kiujn Lapenna verkis dum sia multjara agado.

